



8.8.1974

CGC Nº

00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103

Telefone (061) 226-1298

70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruas, 471

Telefone (011) 275-1681

04.068 - São Paulo - SP

NOV/DEZ/1983

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 80

PRI LA KVARA BKE-KONGRESO



Dum la solena inaŭguro, parolas Carlos Cunha, sidanta inter Prof. Mabesoone, kolonelo Galvão Marinho k Prof. Ivon Barbosa.

Sub la plej diversaj aspektoj estis tre kontentiga la lasta kongreso de BKE okazigita en Recife kaj Olinda, de la 12-a ĝis la 15-a de novembro, danke al la oficiala kunlaboro de Pernambuka Esperanto-Asocio, ĉefadministrata de s-ano Amaro Pinangé Soares, kaj al organizkapablo, kompetenteco kaj sindonemo de la membroj, kunordigantoj kaj helpantoj de la Loka Organiza Komitato, kiun prezidis Prof. J. M. Mabesoone.

Krom aŭtoritatoj, ĉeestis la solenan malfermon Prof. Francisco de Souza Almada, membro de la honora patrona komitato de UEA: kolonelo Fernando José Galvão Marinho, prezidanto de BEL; D-ro José Luiz Ferreira, prezidanto de BEJO; Prof. Ivon Barbosa, ĉefdelegito de UEA por Brazilo; du eksterlandanoj, D-ro Victor Sadler, eksdirektoro de la Centra Oficejo

de UEA, kaj s-ano Alfredo Aragón, el Kolombio; dekoj da gravaj gvidantoj de E-organizaĵoj kies longan liston neeblas menci, kaj la plimulto de la kongresaliĝintoj el dek unu brazilaj ŝtatoj.

La laborkunsidoj, prelegoj kaj la sankta meso okazis en la Katolika Universitato de Pernambuco, sed la solena inaŭguro de la kongreso havis kiel scenejo la luksan aŭditorion de CELPE - Recife, kie ĉeestis pli malpli cent sesdek personoj.

Kompreneble, en tiu ĉi okpaĝa Bulteno ne povis la redakcio raporti detale pri ĉiuj laborkunsidoj, distraĵ aranĝoj, prelegoj, ekskurso ktp., de la kongresa programo. Male, nur kelkaj programeroj ricevis specifan analizon aŭ komenton en aliaj kolumnoj de tiu ĉi numero. Guste pro tio, ni publike dankas kaj gratulas ĉiun preleginton pro lia kultura aŭ religia kontribuo al la sukceso de la kongreso, nome: João Batista da Silva (Kongresa temo: Esperanto en Fakultatoj kaj Lernejoj); Prof. F. S. Almada (Konversacio en Esperanto); Prof. Evald Pauli (Scienco, Filozofio kaj Esperanto); Prof. Walter Francini (Du Juveloj en la Esperanta Literaturo); Prof. Paulo Amorim Cardoso (Logozofio), nova maniero senti kaj koncepti la vivon); D-ro César Barros Leal ("Falsaj Amikoj"); S-ino Maria Almada (Arto en la E-Movado); Prof. J. M. Mabesoone (Regionigo de E-Movado en Brazilo); Prof. Ivon Barbosa (UEA kaj la delegita reto); Prezidanto Carlos A. Cunha (Financa rezulto de la 66-a UK); Pastro Francisco de Oliveira Barros Leal, S.J. (Katolika diservo); Prof. Nelson P. Souza (Spiritismo Kunveno); kaj Carlos Pereira Rezende Neto (Kulto Protestanta).

La kongreso finiĝis la 15-an, per adiaŭa tagmanĝo ĉe Olinda Praia Klubo, kie koncentriĝis la kongresanaro tuj post la okazigo de bela kaj instrua eksturso tra Olinda, kiu fakte estas senkompara historia monumento de la homaro.

LA KVARA BKE-KONGRESO STATISTIKE

Publiko ĉeestanta la inaŭguron	160
Kongresaliĝintoj	138
Virinseksaj	53
Viroj	85
Aliĝintoj laŭ la ŝtatoj:	
Pernambuco	45
Ceará	29
São Paulo	21
Rio de Janeiro	17
Distrito Federal	10
Paraná	06
Bahia	03
Rio Grande do Norte	02
RS, AL, SC po	01
Eksterlandanoj	02
Naciaj salutleteroj ricevataj	07
Eksterlandaj salutoj (UEA)	01
Generalaj enspezoj - Cr\$	761.400
Elspezoj - Cr\$	581.502
Neta profito - Cr\$	179.898
50% destinitaj al PEA - Cr\$	89.949



BRAZILAJ NOVAĴOJ

★ **MARIA ALMADA** montras sian arton en la Artgalerio Esperanto, situanta ĉe Strato Timbiras n-ro 8, en la urbo Santos-SP. La ekspozicio de ŝiaj pentraĵoj estis inaŭgurita la 19-an de decembro kaj daŭros malfermata al vizitantoj ĝis la 15-a de januaro 1984. Pri la artinklino de Maria Almada, la spertulo Omar Pelegatte diris la jenon: "Ŝia pentraĵo havas la subtilecon de l' belo kaj ĉiu verko sentigas al ni la mesaĝon de kiu, sendube, tre baldaŭ havos la eblecon arte-flugi pli alten".

★ **ELVIRA FONTES** finis sian mandaton kiel prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo. La E-movado en diversaj komunumoj de la ŝtato tre multe ŝuldas al la senlaca laboro de tiu kompetenta samideanino. Sed ne maltrankviliĝu: ĉiutage ŝi deĵoras en la sidejo de la Asocio, kaj tie laboras verŝajne pli intense ol antaŭe.

★ **EURICO ANTONIO RIBEIRO** prezidas nun la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, kies ceteraj estraranoj estas: Walter Francini - vicprezidanto; Symilde Schenk Ledon, 1-a sek; Francisca Martos, 2-a sek; Jonas F. de Oliveira, ĝenerala kasisto. BKE salutas ĉiujn novajn estraranojn, dezirante al ili feliĉan oficerperiodon.

★ **KOMUNIKOJ**, riĉenhava bulteno eldonita de Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz (Caixa Postal 3133, BR 20001-Rio de Janeiro-RJ), reaperis en decembro, sub la n-ro 32. Ĝi publikigis raporton pri la 4-a BKE-Kongreso en Recife, kiun ni kordankas.

★ **DELIO PEREIRA DE SOUZA** ricevis multajn gratulleterojn pro la verko "Homaranismo". Inter ili, tiun de Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

★ Ni bonvenigas la ekaperon de UALE-Bulteno, bele presita kaj redaktita de s-ino Maria Almada, kies unua numero cirkulis dum novembro 1983.

★ La Fondaĵo pri Kulturo kaj Turismo de Pelotas-RS (FUNDAPEL) aŭspicias elementan E-kurson gviditan de Prof. Paulo Domingos Mieres Caruso, en la periodo 22/10 ĝis 17/12/83. Partoprenis 42 gelerantoj kaj la kurso okazis ĉe Supera Lernejo pri Muziko, apartenanta al la Federacia Universitato de Pelotas (Fscm).

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

HONORA PREZIDANTO

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP.

Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás, 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

Vic-prezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15, BR 71500 - Brasília - DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr\$ 2.000,00
Por aliaj landoj, US\$ 5.00
Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

RESPONDECAJ DIREKTOROJ

Carlos A. S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.



TRA LA MONDO

ESPERO KATOLIKA PETAS KUNLABORON

☆ P. Batista Cadei, redaktoro de la Esperanto-programo de Radio Vatikana kaj nuntempe kunredaktoro de *Espero Katolika*, intencas pliampleksigi la horizonton de tiu revuo. Sed, por plenumi la intencon, li nepre bezonas kunlaboron el ĉiuj mondpartoj, precipe pere de artikoloj pri travivaĵoj en ekstereŭropaj landoj, pri Esperanto-literaturo kaj Esperanto-terminaro, beletraĵoj kaj recenzoj. Do, kiu kapablas kaj povas bv. helpi. La revuo ja bezonas pliriĉigi kaj variigi sian tradician enhavon! Kunlaboraĵon oni sendu al la Centra Oficejo de *Espero Katolika*, Via Berni, 9, I-00185, Roma, Italio.

69-a UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO

☆ La venontjara kongreso okazos en Vankuvero, Kanado, de la 21-a ĝis la 28-a de julio, kaj la kongreskotizoj por la dua periodo (01-01-84 ĝis 14-05-84) estas jenaj: Kongresano NE individua membro de UEA, 175; Kunulo/junulo/handikapulo-Ne individua membro de UEA, 140; kaj Kunulo/junulo/handikapulo-individua membro de UEA, 105 Guldenoj. Kontraŭ kurzo de po Cr\$ 309,00 ĉiu Guldeno, la aliĝo en la supraj kategorioj kostos en nacia monbileto: Cr\$ 64.890; Cr\$ 54.075; Cr\$ 43.260 kaj Cr\$ 32.445, respektive. Ŝajnas, ke la tarifoj estis fiksitaj nur por riĉuloj. Pro tio ni kredas, ke la partopreno de esperantistoj el la tria mondo estos tre signifa. Bedaŭrinde!

ZAMENHOFA GENEALOGIO

☆ D-ro Stephen Zamenhof, biokemiisto en la Universitato de California, Los Angeles, pere de leteroj interŝanĝitaj kun s-ano Cícero Pimentel (Rua Ana Neri 146, CEP 09250 Utinga, Sto. André-SP), informis sian parencecon kun la kreinto de Esperanto, de kiu li estas nevo. Flanke de la informinto, ankaŭ ligiĝas al la Majstro jenaj personoj: Ludwik Zamenhof (9, Ave de Verdun, 92330 Sceaux, Francujo; Maryla Szper (13, Rue Traversière, 92100 Boulogne - Billancourt, Francujo; D-ro Robert G. Zamenhof (129 Clinton Road, Bookline, Mass. 02146, USA) kaj Mira Horne (3420 - 29th, N.W. Washington, D.C. 20008).

JUBILEA SIMBOLO

☆ Post vigla diskutado, la estraro de UEA decidis pri la Jubilea Simbolo. Oni elektis la konkursaĵon de I.S.Hilmar, el Brazilo.

MODELA ASOCIO

Nelson P. Souza

Ĉu vi povas imagi, karaj gelegantoj, ke ekzistas en Brazilo E-Asocio funkcia en duetga domo sur plej centra strato en granda urbo?

Mi ne revas... Mi vizitis ĝin!

En la teretaĝo: vestiblo, 9 lernoĉambroj! 1-ĉambro por unstruistoj (kiu alia E-organizo havas tian?), sekretario, ĉambro de arkivoj, biblioteko, kantino, ĉambro kun mimeografo kaj 2 projekciiloj. Supre malgranda aŭditorio, verando. Apude bela ĝardeneto, kaj malantaŭe loĝoĉambroj por servistoj. La ŝtato pagas funkcionalon kaj subvencias la tutan materialon por la funkciado mem: purigado, kursoj, korespondado ktp.

La Estraro deĵoras ĉiutage, kaj oni plej atente zorgas pri la E-instruado laŭ pedagogia kaj didaktika principoj far kompetentaj kursgvidantoj. Tre grava afero: ili regule kontaktas kaj informas pri Esperanto la ŝtatajn aŭtoritatojn kaj oficialajn instancojn. Vere modela Asocio.

Mi ripetas: mi ne revas!

Iu bonkora viro sen familio testamente donacis tiun domon al la ŝtato por senprofitcela uzo, ĉefe por edukado. Kaj tiam iu tre laborema esperantisto (influhava en la ŝtato) sukcesis preni ĝin por la uzo de la loka Asocio.

Ŝi estas VIVALDINA CAYMI, en Salvador, Bahia. Nun ŝi batalas por la definitiva posedo de tiu mirindaĵo.

Mi tute ne petis al ŝi permeson, ĉar mi certas ke ŝi pro modestecko malpermesus, sed mi volas aldoni ion. Oni skribu gratuletojn al ASSOCIAÇÃO BAHIANA DE ESPERANTO (Av. 7 de setembro, 109 - 40000 Salvador-BA). Krome: se ili havigos la definitivon, ili devos baldaŭ fari riparojn en la domo, tial oni devos sin proponi por tutlanda helpo al tiu modela Asocio.

UEA SALUTIS NIN

Pro la okazigo de la Kvara BKE-Kongreso, ĝentilajn salutojn per leteroj aŭ telegramoj ni ricevis de Universala Esperanto-Asocio, Universidade Católica de Pernambuco, Federação Espírita Brasileira, Associação Bahiana de Esperanto, Esperanta Klubo Zamenhof, de São Miguel Paulista-SP, APEC-Associação Progresso de Ensino e Cultura, de Bauru-SP, kolonelo Adolpho Miranda Silva kaj Amálio H. de Carvalho.

La mesaĝo de UEA, de 30-10-83, tekstas jene:

"Al Kongreso de Brazilo Konsilantaro de Esperanto. Estimataj Gekongresanoj. En la nomo de Universala Esperanto-Asocio mi ellore salutas ĉiujn partoprenantojn de via kongreso. Mi esperas, ke la ĉi-jara ĉefa aranĝo de BKE signifne kontribuos al la sukcesa evoluo de via Organizaĵo kaj servos la harmonian kunlaboron inter la brazilaj esperantistoj. Sincere via: Flora Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA".

LA KONGRESO ĈE SPIRITISMA MEDIO

(Casc)

La 13-an de novembro 1983, je la 16h30, ĉirkaŭ 1.000 personoj amasiĝis en la granda salono de la sidejo de Pernambuka Spiritisma Federacio (Av. João de Barros, 1629, Encruzilhada-Recife), kie okazis speciala dimanĉa kunveno por akcepti multnombrian grupon de spiritistoj-esperantistoj partoprenantaj en la IV-a Jarkongreso de BKE.

S-ro Holmes Vicenzi prezidis tiun grandiozan eventon, en kiu aktive partoprenis s-anino Maria José Pontes, direktorino de FEP, Nelson Pereira de Souza kaj Prof. Walter Francini, respektive vicprezidanto kaj estraro pri kulturaj aferoj de BKE, kaj s-ano José Saraiva Mattos, delegito de nia Organizaĵo en Salvador-BA, kaj gvidanto de Esperanto Stud-grupo Zamenhof, fako de la Spiritisma Federacio de tiu Ŝtato. Inter la ĉeestantaro troviĝis s-ro Alfredo Aragón, el Kolombio, Prof. Ivon Barbosa, nuntempa ĉefdelegito de UEA, s-ro Afonso Caboim, de Campina Grande-PB, kaj la prezidanto kaj kasisto de BKE, tiu ĉe lasta, s-ro José Carlos Dorini Ramos, apartenanta al la Grupo Zamenhof, de Brasília.

Nelson Pereira de Souza, kiel ĉefa preleganto de tiu kunveno, longe kaj entuziasme parolis pri la misio de Zamenhof, pri la disvastigado de la spiritisma doktrino tra uzado de la Internacia Ligo, pri starigo de E-grupoj en ĉiuj spiritismaj randoj de la lando kaj pri la disvendado de Esperantaj verkoj en ĉiu foiro de spiritaj libroj.

Koncerne al tiu bela renkontiĝo, ni publikigas malsupre la preĝon elparolitan de Prof. Francini, kaj la salutleteron senditan de Brazila Spiritisma Federacio (FEB), dokumento kiu bedaŭrinde ne alvenis je ĝusta tempo por ĝia laŭta legado dum la kunsido.

LA PREĜO

"Sinjoro.

Jen ni denove, la brazilaj esperantistoj enkar-niĝintaj kune kun la elkarniĝintaj, en komuna kunveno por laŭdi Vin pro Viaj senfinaj justeco kaj boneco; por danki Vin por ĉiuj favoroj, kiujn Vi verŝas sur ĉiujn Viajn filojn, kaj speciale sur nin, esperantistojn.

Niaj koroj ja estas plenaj de ĝojo, de frata sento, de aspiro al pli bona mondo, ĉar Vi sendis al ni la apostolon de la internacia inter-kom-preniĝo kaj - por helpi lin - taĉmenton da pioniroj, kiuj en ĉiuj anguloj de la terglobo lanĉis la semon de la frateca interkomunikado, samkiel pere de medianoj Vi ankoraŭ sendas la fratan mesaĝon pri Esperanto.

Sinjoro, feliĉaj kaj dankaj pro la oportuno

kunigi denove sub la stardardo de la verda stelo, ĉiĉoj en la brazila Venecio, ni petas Vin benon por la organizintoj kaj por la partoprenantoj en tiu ĉi kongreso; por la direktoroj de Pernambuka Spiritisma Federacio, kiuj tre amike gastigas nin en ĝia sidejo; por la esperantistoj, kiuj agas por Esperantismo en ĉiuj mondpartoj; ni petas Vin, Sinjoron, ke ĉiu esperantisto fariĝu soldato de la harmonio, ĉar Esperanto sen fratecaj sentoj ne estas Esperanto; kaj fine, en tiu ĉi sankta templo ni petegas Vin, Sinjoron, ke la progreso de la brazila E-Movado kresku senĉese. kaj la komenciĝanta komuna laboro inter la kupolaj naciaj societoj pli kaj pli efektiviĝu, ĝis kiam ĉiuj grupoj kunordiĝus en unu solan nacian asoc-ion, kun neŭtrala nomo, por la definitiva triumfo de Esperantismo en Brazilo kaj en la mondo.

Ke tiu ĉi aspiro fariĝu komuna al ĉiuj, Sinjoro, kaj ke baldaŭ ni brazilanoj povu prezenti al Vi tian pruvon pri niaj racieco, sindediĉo al la Afero, kaj morala kresko. Tiel estu".

LETERO DE FEB AL SPIRITISTOJ-ESPERANTISTOJ

Brasília (DF), la 13^a de Novembro de 1983

"Estimataj Fratoj kaj Fratoj, kunvenintaj en Recife kaj Olinda okaze de la IV^a Jarkongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Pacon en la nomo de Kristo!

Ricevinte afablan inviton de la Organiza Komitato prezidi en via kunsido, en la nomo de Brazila Spiritisma Federacio, ni kun granda bedaŭro devis rezigni la honoron pro nevenkeblaj cirkonstancoj, kiuj malhelpis nian alveturon al la Kongreso.

Tio tamen tute ne malhelpas, ke nia respektinda Federacio reprezentu ĝin en via homana manifestado, ĉar ja kie kunvenas koroj tuŝitaj de la vera doktrino de Jesuo, tie nepre estas reprezentata la Domo de Iŝmael per la ĉeesto de ties spiritaj gvidantoj. Penu do ilin altiri en vian kunsidon, trinku el la fonto de ilia nobla inspiro, - kaj el viaj debatoj nepre rezultos plej utilaj strategioj kaj decidoj por la estonta brila venko de nia komuna idealo.

Per tiu ĉi letero ni volas unue sciigi vin pri la laste faritaj paŝoj rilataj al la partopreno de la Federacio en la festoj de la Centjara Jubileo de Esperanto. Krom la reeldono de antaŭ longe elĉerpitaj verkoj, nome "Esperanto-Modelo", "Monumento de Carlo Bourlet", "Diverskolora Bukedeto", "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia" kaj "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo", la eldona fako de la Federacio prizorgas la duan eldonon de la portugallingva verko "Dr. Esperanto", de nia kompetenta samideano Prof. D-ro Walter Francini, kiu afable konsentis pri la definitiva forĉedo de la aŭtoraj rajtoj, kun aprobo de la unua eldoninto, "San-Paŭlo Esperanto-Asocio".

Ekster la kadro de la Jubileo elstaras jenaj

bonaj novaĵoj:

— jam estas finkompostita la dua eldono de "La Libro de la Spiritoj" de Allan Kardec, kaj ja post nelonge ĝi estos disponebla por la leĝma esperantista publiko;

— nia senlaca samideano el Belo Horizonte, Allan Kardec Afonso Costa, ĉiam ankoraŭ laboradas super portugala-esperanta vortarego, kies aŭtorrajtojn li ankaŭ forcedos al la Federacio. Tiu ĉi grava verko konsistigos, kune kun "Esperanto sem Mestre", "Primeiro Manual de Esperanto" kaj la Esperanto-portugala vortaro de Iŝmael Gomes Braga, kompletan kolekton, kiu garantios al lernantoj, perfektigantoj, instruistoj, tradukistoj, verkistoj kaj ceteraj propagandistoj de la lingvo konstantan disponeblecon de nepre necesaj lernolibroj kaj vortaroj;

— fine, ni ĝojas sciigi vin pri la disvolviĝo de afero iniciatita okaze de la pasintjara III^a Kongreso de B.K.E., en Brazilio, dum la spiritista kunsido en la ĉefurba sidejo de nia Federacio. Temas pri la disvastigo de nia kara lingvo inter la tutmonda spiritistaro. Kleraj samideanoj afable prenis sur sin la taskon truduki en la anglan, la francan, la hispanan, la italan kaj la germanan la mesaĝon "Esperanto kiel Revelacio", diktitan de F.V. Lorenz al F.C. Xavier en la 19^a de Januaro 1959, kaj kies portugallingva originalo estis publikigita en la Aprila numero de "Reformador" de tiu jaro. La nacilingvajn tradukojn de tiu bela paĝo ni alsendos, kune kun bazaj informiloj pri la lingvo kaj ties movado, al la koncernaj spiritistaj grupoj eksterlandaj.

Ni ankaŭ aparte ĝojas pro la ĉiam pli kreskanta nombro da grupoj en nia spiritista tendaro por studo de Esperanto kaj flegado de ties idealo.

Ni esprimas la deziron, ke via kunsido omaĝu la karan memoron de tiuj, kiuj en la pasinto, meze de plej grandaj malhelpoj, plugadis la kampon pene kaj ŝvite por ke ni hodiaŭ daŭrigu la laboron sur vojo pli glata kaj jam rikoltu tiel belajn fruktojn. Al iliaj Spiritoj la esprimon de nia sincera danko!

Brilan sukceson al la IV^a Jarkongreso de Brazilia Konsilantaro de Esperanto!

Dio estu nia konstanta inspiro!

Frate via,

Afonso Borges Gallego Soares
2^a Sekretario".

EN KIAJ LERNEJOJ?

"Esperanto en universitatoj kaj lernejoj" estis la temo de la 4-a Kongreso de BKE. Dum la kunsido por debati ĝin, sub la gvidado de s-ro Nelson Pereira de Souza, unue prelegis s-ro João Batista da Silva, kiu opiniis kontraŭ la enkonduko de Esperanto en unuagradajn lerne-

jojn. Poste okazis pluraj intervenoj. S-ino May emfazis la neceson organizi Esperanto-kursojn unue en universitatoj por: a) atingi internacian kunlaboron de la sciencistoj kun la celo eviti atommiliton kaj solvi ekologiajn problemojn; b) prepari novajn instruistojn de Esperanto. Prof. Mabesoone reliefis ke la plimulto de la interesatoj pri Esperanto en universitatoj studas homajn sciencojn; la studentoj de natursciencoj ĝenerale ne interesiĝas pri Esperanto, "ĉar oni internacie interkompreniĝas en la angla, laŭ propra sperto". Li proponis ke la sciencistoj publikigu siajn verkojn nur en Esperanto kaj ke la saman publikadon oni ne ripetu en aliaj lingvoj. "Ni serĉu la motivojn por natursciencistoj". S-ro Ivon Barbosa asertis ke instruado al universitatanoj estas antaŭpaŝo por la fina venko de Esperanto. Tio signifos la uzadon de la internacia lingvo en tekniko kaj scienco. "Ĝis kiam ni ne disponos pri sufiĉe granda nombro da teknikaj kaj sciencaj verkoj en Esperanto, mankos al ni konvinkaj argumentoj por enkonduko de la internacia lingvo en la universitatojn. Bonaŭguraj do estas la laboroj de la Centro de Sciencaj Eldonoj en Budapeŝto". S-ro Marinho opiniis ke en universitatoj la plimulto de la studentoj ne havas tempon por lerni Esperanton. Do estas preferinde enkonduki la internacian lingvon en unua - kaj duagradaj lernejoj. Li proponis ke la landaj asocioj konstante sendu informojn pri Esperanto al la edukaj instancoj. D-ro Sadler ŝame rekomendis ke Nacia Esperanto-Komisiono sisteme informadu kaj kontaktadu la membrojn de Federacia Konsilantaro pri Edukado. Plie, ke oni lernu el la manlibro "Financa Evoluigo", de H. Tonkin, kaj ke oni traduku kaj eldonu portugallingve la serion de Esperanto-dokumentoj de UEA, kiel bazan materialon por informado ĉe tiaj instancoj. Pri instruado de Esperanto en unua - kaj duagradaj lernejoj d-ro Sadler, opiniis "la instruadon de Esperanto al infanoj eduke valora senkonsidere pri la praktika utiligo, ĉar ĝi konsciigas la lernantojn pri la karaktero mem de la homa lingvo kaj pri la rilato inter lingvo kaj pensmaniero". Malfavore al instruado de Esperanto en unuagradaj lernejoj opiniis prof. Mabesoone; same s-ro Ivon Barbosa, asertante ke infanoj estas dependaj personoj kaj ke post lerno de la lingvo ili ne farigis utilaj al la movado. "Instruado al infanoj nur fare de la gepatroj". Tamen s-ro Barbosa konsideris la instruadon de Esperanto en duagradaj lernejoj tre oportuna, utila kaj profitdona. Ankaŭ prof. Mabesoone opiniis simile, asertante ke la instruado en duagrada lernejo taŭgas kiel antaŭpreparo por la universitato. S-ro Francini, ripetante la opinion de la karmemora Iŝmael Gomes Braga, sugestis ke "oni instruu Esperanton ekde infangardeno ĝis universitato", pro la edukaj valoroj de la internacia lingvo, intime ligitaj al la homaj rajtoj, kies regado sur la mondo estu idealo de ĉiu civilizita homo (wrf).

FLUGANTA TELERO EN PERNAMBUKO

Ke la 4-a BKE-Kongreso okazinta en Recife-Olinda atingis grandan sukceson estas afero pri kiu meniu dubas. Tiurilate oni legas aliloke en tiu ĉi numero precizajn informojn. Tie ĉi mi nur volas diri ion pri la arta vespero okazinta en Sیده de Populara Arto, en Olinda. La unuan parton konsistigis portugallingva pupteatraĵo, kiun oni nomas en Nordoriento "mamulengos". La spektaklo obeas kompreneble al difinita teksto, sed ĝi enhavas multe da improvizaĵoj, laŭ la partopreno de la publiko. En la prologo ja la reĝisoro informis ke la spektaklo ne estas nur spektota, sed ankaŭ ŝerce partoprenota de la publiko. La roluloj (kiuj sin kaŝas sub la scenejo, de kie ili movas la pupojn) deklamas kaj verse respondas al la intervenoj de la publiko. Alia interesa aspekto estas ke la roluloj ŝercis pri gravaj ĉeestantaj personoj.

Al kelkaj spektantoj ne plaĉis la ofta uzado de maldecaj vortoj kaj la prezento de skandalaj scenoj, kiuj vere ne estas necesaj por vekti la atenton. Tamen mi opinias ke en populara spektako, kia "mamulengos", tio ne multe gravas, des pli ke ĉio estas ŝerce, legere kaj spontanee prezentata, sen iu alia celo.

En la dua parto de la arta vespero prezentiĝis "Fluganta Telero", muzika spektaklo, kie juna muzikanto, akompanata de ali gitaristo, verve ludis kaj kantis plurajn siajn muzikojn kun versoj en Esperanto.

Miaopinie la arta vespero estis plene kontentiga, kaj pro la portugallingva regiona pupteatraĵo kaj pro la originala muzika kontribuado en Esperanto fare de lerta samideano, Carlos Frederico lopes ALHEIRO, kiu ĝuste adoptis la artan nomon Fred Esperantista (wf).



JUS APERIS

Spirita Eldona Societo Lorenz ĵus lanĉis en la portugala lingvo la verkon "Homaranismo - A Idéia Interna", kie ĝia klera aŭtoro Délio Pereira de Souza prezentas kaj komentarias la etikan penson de Zamenhof. Malmultaj homoj scias ke, krom krei la internacian lingvon, Zamenhof ellaboris ankaŭ etikan sistemon, de li nomitan "homaranismo", celante unuigi en komuna morala programo la adeptojn de ĉiuj religioj kaj filozofioj. Tiu programo konsistigis la plej grandan aspiron de sia aŭtoro; vere Esperanto estis nur la ligva ilo por atingi la universalan komunecon.

"Homaranismo - A Idéia Interna" estas verko vekanta grandan intereson pro la emocia prezentado de ĝia enhavo kaj pro la didaktika zorgo detale klarigi la etikan Zamenhofan penson. Mendojn oni faru al la menciita eldonejo, Caixa Postal 3133, CEP 20000, Rio de Janeiro, RJ.

Same eldonita de Societo Lorenz, ĵus aperis Almanako Lorenz 1984.

Kio estas "almanako"? Laŭ la brazila vortaristo Aurelio Buarque de Holanda Ferreira, ĝi estas "eldonaĵo, kiu, krom kompleta kalendaro, enhavas ankaŭ kontribuadojn distrajn, humurajn, sciencajn, beletrajn kaj informajn". Almanako Lorenz ja enhavas ĉion tion, sed pro la celoj de Societo Lorenz, abundas en la verko religiaj temoj. Sed tio okazas sen sekteco: oni legas en Almanako artikolojn pri Spiritismo, Katolikismo, Budhismo, Seĉo-No-Je' kaj aliaj religioj, kun plena respekto al ĉies kredo, laŭ la rajto kiun ĉiu homo havas libere pensi kaj kredi. Pro tio kaj pro la varieco de la temoj, la plaĉa grafika aspekto de la verko kaj ĝia bona papero, Almanako Lorenz 1984 estas legaĵo, agrabla, instrua, pensiga kaj samtempe distra, nepre rekomendinda al niaj legantoj (wf)



KONTRIBUAĴOJ POR LA BULTENO

Por subteni la eldonkoston de tiu ĉi informbla Bulteno, mondonacojn kaj abonojn ni ricevis de la subaj personoj, kiujn ni ellore dankas:

Dr. Modesto Belmonte de Abreu	Cr\$ 4.000,00
Anonimulo	Cr\$ 1.500,00
Alfredo dos Santos Guerreiro	Cr\$ 2.000,00
Antonio Rodrigues da Silva	Cr\$ 1.000,00
Ludimar Azevedo da Silva	Cr\$ 3.000,00
Pollone S.A. Ind.e Comércio	Cr\$ 15.000,00
Pomp Tur-Pompéia Tur. Ltda.	Cr\$ 15.000,00
Idália de Freitas Lima	Cr\$ 2.000,00
Cícero Barros Pimentel	Cr\$ 2.000,00

Al niaj legantoj, sed ankoraŭ ne aliĝintaj al BKE kiel individuaj membroj, ni informas, ke la abonkosto de la Bulteno por 1984 estas Cr\$ 2.000,00. Eksterlanden, US\$ 5.00.

BKE-ALIĜKOTIZO 1984

La kotizo por aliĝo aŭ realiĝo al BKE en 1984 estas de Cr\$ 4.200,00 jare, pagebla ĝis la 31-a de marto venonta.

Por fariĝi nova ano de nia Organizaĵo, sufiĉas sendi al nia sidejo en Brazilja la kotizon supre menciitan, prefere per simpla ĉeko de la propra interesito, kune kun informoj pri la tuta nomo, naskiĝdato, civila stato, instru-nivelo, telefonnumero kaj kompleta adreso.

Aliĝu tuj. Ni ja bezonas vian helpon!


Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.



Kongresa grupo atendas la omnibuson por plezura promenado en Olinda.



Survoje al Recife, Prof. Walter Francini, lia edzino Rosa kaj s-ino Nair Cunha.



En Brazilja, Dorini, Cunha kaj Nelson pritraktas la buĝeton de BKE por 1984.



Gilka kaj Majoro G.Silva Velho, nacie konata pro lia gazetara E-servo.

LA AGADO DE D-RO SADLER EN BRAZILIO

La antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA, d-ro Victor Sadler, vizitis en novembro la nord-orientajn ŝtatojn de Brazilo. Post partopreno en la 4-a Kongreso de Brazilia Konsilantaro de Esperanto (en Recife), li vizitis ankaŭ João Pessoa, Campina Grande, Natal, Fortaleza, Casvavel (CE), Maceió kaj Salvador.

En Fortaleza li estis oficiala gasto de la Federacia Universitato de Ceará, kie li prelegis i.a. pri "Lingvaj problemoj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo".

En januaro-februaro d-ro Sadler vizitos la plej sudajn ŝtatojn de la lando.

BONDEZIROJ POR 1984

Pro la jarfinaj festoj kaj novjaro, la estraro de BKE ricevis dekojn kaj dekojn da salukartoj de siaj amikoj, asocioj kaj liveristoj.

Ĉiujn ni dankas pro iliaj bondeziroj, kaj esperas, ke 1984 estu por la homaro kaj Esperanto-movado jaro plena de paco, amo kaj prospero!

Legu tiun ĉi Bulteron por ke vi konu novajn faktojn; abonu por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

FINANCA REZULTO DE LA 66-a UK

Prelegis Carlos A. Cunha

Ekde 1905, okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulogne-sur-mer, ĝis la lasta Kongreso en Budapeŝto, ĉi-jare, la plej alta financa rezulto veninta el tiuj eventoj estas tiu liverita de la 66-a UK okazinta en Brazilja, en 1981, kies Lokan Kongresan Komitaton ni partoprenis kiel ĝia ĝenerala kasisto kaj samtempe kiel ĝia financa plenpova peranto por la tuta lando. Imagu, do, la grandan respondecon kaj pezajn taskojn kiujn ni havis sur la ŝultroj dum 4 jaroj, tio estas, ekde la nomigo de Loka Kongresa Komitato, en 1979, ĝis la finaprobo de la kontaro, en 1983.

Kompreneble, ni estas antaŭ vi, ne por prelegi pri la komplikaĵoj de la kasistaj laboroj rilataj al la 66a UK. Tamen, konsilindas rapide raportoj pri kelkaj epizodoj, por ke vi komprenu kial la altaj monsumoj manipolitaj kaj la amaso da taskoj tiam fendaj preskaŭ frenezigis nin, ĝuste pro la minacanta timo je okazigo de eventuala monperdo antaŭ la neebleco fari tujan kontrolon de la altaj valutoj ricevitaj kaj pagitaj.

Krom tio, multaj el vi ne scias, ke tri membroj de la tiama LKK (D-ro Enivaldo Alves Silva, Neima Cardoso Adorno kaj mi) vojaĝis al Stokholmo en 1980, okaze de la 65-a UK, por propagandi persone nian kongreson, varbi aliĝantojn kaj preni la gradan verdan flagon, kiu tradicie ornamas la scenejon de ĉiuj inaŭguroj de universalaj kongresoj. Tie, en Stokholmo, ni rikoltis la sumon de 16.500 ŝvedaj kronoj (pli ol Cr\$ 1.700.000,00), kiuj, senŝanĝe, ni kunportis al Braziljo, por gajni tie ĉi la kurzdiferencon kaj eviti perdon pro la inflacio. Saman iniciaton ni havis dum la II-a Tuta Amerika Esperanto-Kongreso okazinta en São Louis, Argentino, kie, komisiitaj de ni kaj en nia nomo, S-ro Giuseppe Grattapaglia kaj Nelson Pereira de Souza ankaŭ verbis multajn geesperantistojn por nia kongreso en Brazilja. Laŭ nia orientigo, la argentinajn monbiletojn tie ricevitajn, oni ŝanĝis en Buenos Aires kontraŭ US\$ 1.426,00, kaj kunportis ilin al Braziljo, por kompensi la konstantan senvalorigon de la nacia mono.

Kiel vi vidas, anstataŭ sidigi komforte kaj trankvile en Brazilja por atendi la envenon de kongresaliĝoj por la 66-a, unu jaron antaŭ la okazigo de nia evento, ni persone transiris la limojn de nia lando, por varbi interesatojn kaj kapti rimedojn por la kongresa kaso.

Sed nia strategia atako ne limiĝis nur al Svedio kaj Argentino. Depost la 65a UK en Stokholmo, ni vojaĝis, per propraj rimedoj, al aliaj eŭropaj ĉefurboj - Kompenhago, Madrido, Lisbono kaj Londono - por daŭrigi la **vendadon de nia fiŝo**, tio estas la 66-a Universala Esperanto-Kongreso en Brazilja.

Danke al tia vigla kaj objektiva agado, kaj al la senkompara prestiĝo de la membroj de la Loka Kongresa Komitato, je kies antaŭo majstre rolis la senatano José Lins Albuquerque, ni sukcesis havigi al la kongresa kaso tre gravajn subvenciojn, per kontanta mono kaj per senpagaj servoj. Ekzemple, la Ministerio pri Planado donacis la altan sumon de Cr\$ 3 milionoj; Banko de Braziljo, Cr\$ 200.000,00; Regiona Banko de Brazilja, Cr\$ 50 mil. Kiel nemonaj subvencioj, ni havis la permeson uzi senpage la Centron de Konvencioj, kiu servis kiel kongresejo; la Cambron de Deputitoj, kie okazis la solena kaj majesta inaŭguro; la Nacian Teatron, kie estis prezentitaj la ĉefaj artaj aranĝoj, kaj finfine, ni gajnis de Embratur la presigon de 1.000 grandaj koloraj kongresaj afiŝoj kaj de 30.000 ekzempleroj de la unua kongresa bulteno.

Sekve, ne estas do miraklo, ke la 66-a UK liveris la plej altan financan profiton ĝis nun atingitan de kiu ajn universala kongreso en la historio de la movado sur la terglobo. Krom tio, ekster Eŭropo, estis la evento kiu prezentis rekordan nombron da aliĝintoj: 1.750 kontraŭ 1.710 prezentitaj de la 50-a UK (Tokio, 1965), la antaŭa rekordisto. Nun, ni petas vian atenton por la demonstracio kiun ni faros sur la nigra tabulo, por montri la proporciajn dividadojn de la rekorda kongresa profito: 119.694,91 Guldenoj aŭ Cr\$ 33.360.168,00, je la oficiala kurzo de Cr\$ 278,71, en 04-11-83.

Tamen - ni klarigu - laŭ la artikolo 29-a de la Kongresa Regularo, UEA rajtas depreni 30% de la kongresaj aliĝkotizoj (30% de 132.010,52 guldenoj = 39.603,16 guldenoj), parto kiu iris rekte la centran kason en Roterdamo, antaŭ ol la kalkulado de la disdividon. Tiun deprenon oni devas konsideri kiel "kongresan elspezon", kio malgrandigas la realan profiton al 80.091,75 Guldenoj!

Tiel, laŭ la artikolo 31-a de la sama regularo, la dividado de la supra "neta profito" teknike fariĝas jene:

10% al Kongresa Rezerva Fondaĵo-UEA	8.009,17	Gld.	aŭ	Cr\$	2.232.236,00
45% al Propaganda Konto-UEA	36.041,29	Gld.	aŭ	Cr\$	10.045.067,00
27% al LKK por la loka esperantistaro	21.624,77	Gld.	aŭ	Cr\$	6.027.040,00
18% al la landaj asocioj	14.416,52	Gld.	aŭ	Cr\$	4.018.028,00
	80.091,75	Gld.	aŭ	Cr\$	22.322.371,00

Tiamaniere, prenante la valutojn en 04-11-83, je la kurzo de Cr\$ 278,71, ni konstato, ke el la reala profito de la kongreso, UEA restigis por diversaj celoj 83.653,62 Guldenojn (39.603,16 + 8.009,17 + 36.041,29 guldenoj = Cr\$ 23.315.100,00 aŭ 69,89%), dum nia lando rajtas ricevi nur 36.041,29 Guldenojn (21.624,77 + 14.416,52 Guldenoj = Cr\$ 10.045.068,00

aŭ 30,11%), sumo kiu entenas 9.252,07 Guldenojn apartigitajn de UEA en Roterdamo, kaj tie kontorigistrajn al Brazilja dispono.

Finfine ni informas, ke la ĝenerala bilanco de la universala kongreso en Brazilja, kun la supre indikita dividado de ĝia profito, estis aprobata de la Komitato de UEA en julio 1983, okaze de la 68-a UK en Budapeŝto.